

VENDU ĈION, KION VI HAVAS, KAJ SEKVU MIN. – Komento al Evangelio de p. Alberto Maggi OSM

El la evangelio laŭ Marko 10,17-30

En tiu tempo, dum Jesuo ekiris survoje, venis iu renkonte al Li, kaj genuiĝante antaŭ Li, demandis Lin: „Bona Majstro, kion mi faru, por ke mi posedu la eternan vivon?”

Jesuo diris al li: „Kial vi nomas min bona? Nur Dio estas bona, kaj neniu alia. Vi konas la ordonojn de Dio: Ne mortigu; ne adultu; ne ŝtelu; ne diru falsaĵon kontraŭ iu; ne trompu; respektu vian patron kaj vian patrinon.”

Kaj tiu respondis: „Majstro, ĉi tion mi jam observis de mia juneco.”

Jesuo rigardis lin kun granda amo, kaj diris al li: „Nur unu mankas ankoraŭ al vi: iru, vendu ĉion, kion vi havas, kaj disdonu al malriĉuloj; tiam vi havos trezoron en la ĉielo; poste venu, kaj sekvu Min.” Sed li montriĝis pro tiu respondo embarasita, kaj foriris malĝoja, ĉar li estis tre riĉa.

Jesuo, rigardante la disĉiplojn, kiuj estis ĉirkaŭ Li, diris: „Estas tre malfacile por riĉuloj, eniri en la regnon de Dio.”

La disĉiploj miris pro tiuj vortoj, sed Jesuo insistis: „Pli facile estas por kamelo trairi truon de kudrilo ol por riĉulo eniri en la regnon de Dio.”

La disĉiploj miris eĉ pli ol antaŭe, kaj diris unu al la alia: „Kiu do povas sin savi?”

Jesuo rigardis ilin kaj diris: „Al homoj estas neeble, sed ne al Dio! Ĉar ĉio estas ebla al Li.”

Tiam Petro diris al Li: „Kaj ni? Ni ĉion forlasis por sekvi Vin.”

Jesuo respondis: „Mi certigas vin, ke se iu forlasis domon, fratojn aŭ fratinojn, patrinon aŭ patron, filojn aŭ kampojn pro Mi kaj pro la evangelia mesaĝo, tiu ricevos centoble en ĉi tiu vivo - kune kun persekutadoj - domon, fratojn, fratinojn, patrinojn, filojn kaj kampojn; kaj en la estonteco la eternan vivon.”

Por kompreni la evangelianpecon ni devas lasi nin gvidi de tiu interpreto, nome de la vortoj kiujn la evangeliisto utiligas en sia rakonto por indiki tion kion li volas esprimi. Kiel en tiu ĉi peco, ĉapitro 10 de la evangelio de Marko, ek de versiklo 17 ĝis 30.

La evangeliisto skribas: *dum Jesuo ekiris survoje*. Jen la unua indiko. “Survoje” indikas la lokon de la senfrukta dissemado, kie la semo estis ĵetita teren, sed tuj venis la birdoj. La evangeliisto do volas atentigi nin ke tiu peco estos sub la signo de la senfrukta semado, la vorto ne estos akceptata.

Venis iu renkonte al Li, kaj, genuiĝante... jes aliaj du gravaj elementoj. Ĝis nun kuris renkonte al Jesuo demonhavanto, tio estas persono posedata de io pli forta ol li kiu lin enprizonigas kaj surgenuiĝis apud Jesuo la leprulo, nome la malpura persono kiun oni opinias ekskludita de Dio.

La evangeliisto do estas diranta al ni ke tiu persono estas posedata pli ol demonhavanto kaj pli malpura ol leprulo. La zorgo de tiu homo – kiu estas anonima kaj do signifas ke estas reprezenta personulo – estas kion li devas fari por akiri la eternan vivon.

Nu Jesuo respondas al li preskaŭ ĝenata, ĉar li venis por inaŭguri la regnon de Dio, alernativan socion, li ne venis por doni indikojn pri la eterna vivo. Ĉiukaze Jesuo resendas lin al Dio kaj al liaj ordonoj kaj en tiu kunteksto Jesuo eliminis la tri kiuj estis ekskluzivaj por Israelo, la plej

gravajn ordonojn, la devojn al Dio kaj listigas al li nur kvin ordonojn plus precepton kiuj rilatas la konduton al la aliaj.

Por la eterna vivo ne gravas kiel kaj kion oni kredis, sed gravas kiel oni amis la gefratojn. Kaj Jesuo ilin listigas al li: *Ne mortigu; ne adultu; ne ŝtelu; ne diru falsajon kontraŭ iu...;* kaj je tiu punkto Jesuo enmetas *ne trompu* kiu estis precepto kaj ne ordono. Kial Jesuo ĝin metas inter la ordonoj, donante al ĝi ordonan valoron?

Tiu estas peco prenita el la libro de la Readmono, en kiu oni petas ne trompi la laboristojn, la dungitojn. Jesuo do aludas ke je la bazo de ĉiu riĉaĵo – ĉar ni vidas ke tiu homo estas tre riĉa – ĉiam estas la trompo kaj la fraŭdo. Kaj poste *respektu vian patron kaj vian patrinon.*"

La individuo asertas ke li faris ĉiujn tiujn aferojn ek de la junaĝo. La greklingva teksto montras ke la homo plenigas sian buŝon, kruda, orgojla por ĉio tio... En la greka ĉiujn tiujn aferojn oni diras *Tauta panta*. Estas esprimo kiu plenigas la buŝon.

Jesuo rigardis lin kun granda amo, kaj diris al li: „Nur unu mankas ankoraŭ al vi. Mi tradukas laŭlitere la tekston, ne estas unua nura afero kiu mankas al vi, kvazaŭ por diri "vi faris multon, faru ankaŭ tion". Ne. "Unu mankas al vi" estis esprimo por indiki "Ĉio mankas al vi". Tia observado de la ordonoj, tiomaj religiaj observadoj, kaj tamen ili igis vin individuo – kiel ni vidis – angorplena, maltrankvila.

Tiam Jesuo, kiu lin amas, petas ali esti feliĉa, feliĉigante la aliajn. Li iris al Jesuo por ricevi plion, por ricevi konsilon por sia spirita vivo kaj Jesuo invitas lin doni pli. Kaj fakte li diras al li: *iru, vendu ĉion, kion vi havas, kaj disdonu al malriĉuloj;* tio estas igu feliĉaj la aliajn por esti feliĉa, *tiam vi havos trezoron en la ĉielo,* nome en Dio.

"Poste venu, kaj sekvu Min." Ne estis bonaŭgura por tiu persono renkonti Jesuon. Fakte *li montriĝis pro tiu respondo embarasita, kaj foriris malĝoja,* - kaj la konkludo de la evangeliisto... *ĉar li estis tre riĉa.* Jen kiam ekde la komenco li prezentis la homon kurantan kiel demonhavanto, kaj surgenuiĝantan kiel malpurulo. Tiu opiniis posedi proprajn havaĵojn, reale li estis posedita de ili. Kaj la posedo de tiuj havaĵoj, la egoismo kiu naskiĝis, lin baris al la komuniko kun Dio.

Lia kondiĉo estis pli severa ol tiu de la leprulo kiun Jesuo purigis kaj pli severa ankaŭ de la demonhavanto kiun Jesuo liberigis.

Tiam Jesuo sin adresas al siaj disĉiploj kaj nepre ekskludas ke en lia komunumo povu eniri riĉulo ĉar en la komunumo de la Regno estas loko por la sinjoroj sed ne por la riĉuloj. Kiu estas la diferenco?

Sinjoro estas tiu kiu donas, kunpartigas kun la aliaj; riĉulo estas tiu kiu havas kaj tenas por si mem.

Kaj Jesuo ĝuste klarigas kiom malfacilas por tiuj kiuj posedas riĉaĵojn eniri en la regnon de Dio. Tiu deklaro de Jesuo konfuzigas liajn disĉiplojn. Kontentaj ke finfine estis enironta en lian grupon bonstatulo, riĉulo kiu povintus prizorgi al vivtenadon de tiu grupo de disĉiploj kiuj forlasi ĉion por sekvi Jesuon, Jesuo male lasas ke tiu malproksimiĝu.

Diris unu al la alia: „Kiu do povas sin savi?” Ne temas pri la eterna savo, la verbo indikas subteni, pretervivi, eviti danĝeron, tio estas “Kiel ni povos nin vivteni se vi ne volas ĉi tie kun ni homo kiu estas riĉa?”

Kaj Jesuo diras ke tio estas neebla por la homoj sed ne por Dio. La homoj pensas ke la certeco estu la amasigo, por Jesuo la certeco, la feliĉo estas en la kunpartigo kun la aliaj. Kaj tial reagis la disĉiplo Petro, kiu, preskaŭ defie, diras: “*Ni ĉion forlasis por sekvi Vin.*” Kaj je tiun punkto Jesuo respondas al li listigante serion de sep malhelpoj, kiuj, se malfaciligas la sekvadon de Jesuo kaj la plenecon de la feliĉo, devas esti eliminataj. Pro tio li asertas: “*Mi certigas vin, ke se iu forlasas domon, fratojn aŭ fratinojn, patrinon aŭ patron, filojn aŭ kampojn pro Mi kaj pro la evangelia mesaĝo, tiu ricevos al ĉiu ajn rezigno korespondas la plena abundo centoble en ĉi tiu vivo.*”

La numero cent indikas la benon... *kune kun persekutadoj - domon, fratojn, fratinojn, patrinojn, filojn kaj kampojn; kaj en la estonteco la eternan vivon.* La eternan vivon oni heredas, oni ne ĝin akiras per propraj streĉoj, sed ĝi estas donaco flanke de Dio. Estas krome lasta versiklo, kiu gravas kaj kiu ne estas en la liturgia teksto.

“Sed ĉiuj ankaŭ la unuaj devas esti la lastaj kaj tiuj lastaj estos la unuaj”. Jesuo renkontis iun kiu en la socio estis konsiderata unu el la unuaj kaj lin invitas iĝi lastulo tiel ke ankaŭ la lastaj povus senti sin unuaj.